



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Abono (por dek du numeroj) :

Box 731F, Elizabeth-ŝtr: P.O.,

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 penco.

Melbourne (Aŭstralio).

Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 penco

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 82 (Seventh Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 aprilo 1927

ESPERANTO EN ĤINUJO.

La 17a marto, s-ro Inocento Serviŝev, antaŭe el Harbin, Siberia, kaj redaktinto de "Oriento," denove veris interesege paroladon al Sydney-aj Esperantistoj en sia klubejo. Pritraktante la temon "Esperanto en Ĥinujo," s-ro Serviŝev, en kutime kaj sperta maniero, kondukis la diskutaron spirite al tiu mirinda, nepremita lando, tiu lando de malnova kulturo, kiun li nomis "la lando de filozofoj."

Por plene kompreni la agadmanieron kaj malfacilaĵojn enkonduki novaj ideoj en Ĥinujo, la parolanto analizis dek necesaj komencaj sciindaĵoj:—

a) vasteco, malfaciligante disvastigon.

b) izoleco, popularo diversa dividita en multnombraj provincoj kaj politikaj opinioj.

c) diverslingveco, ne nur skribe kaj buŝe sed eĉ per manaj signoj.

d) maltrankvila stato; skuata per politikaj revolucioj pro ekonomiaj kaj politikaj kaŭzoj.

e) malprogreseco ("ĉiel progresema estas la japano, kiel malprogresema estas la Ĥino")

f) konservemeco, precipe pri Eŭropoj.

g) malrapida pensmaniero.

h) ne bonaj lingvistoj, kvankam ili kapablaj kiam instruitaj.

i) malprofunda popolo al kiu mankas memfido.

h) malriĉeco ("propagando bezonas monon!")

Al tiuj malhelpaĵoj la parolanto aldonis du gravaj helpiloj: abundas diversaj frakcioj, kiuj progresemas (studentoj, inteligentularo k.t.p.) kaj ilin altiras Esperanto, kaj, due, multe pli impresas la "interna ideo," ol la teknika flanko de nia lingvo.

S-ro Serviŝev tiam eniris la praktikan parton rakontante longe pri la starigo kaj progreso de la Pekina Esperanto Kolegio, kie li estis instruisto, kaj la Regna Universitato, Pekin, en kiu Esperanto estas nepra lingvo. Ŝangĥaj, la nun multe prikablita urbo, havas tre viglan esperantistaron kaj nombre la plej potenca en Ĥinujo. Bedaŭrinde propagando estas malhelpata per manko de Ĥinaj-esperantaj vortaroj, kies preparado devus esti la unua afero.

Tamen, neatendita uzado de Esperanto en presitaj libroj ofte okazas. Librojn kun tute Ĥina enhavo troviĝas kun esperantaj titoloj aŭ rezumoj. Kiel ekzemplo la parolanto montris kelkajn, inter kiuj estis unu nomata "Malsukceso de Rusa Revolucio." Alia kurioza uzo de la internacia lingvo estis por doni la jaron de l'apero de la libro, ekz. "Skribita 30 jaroj post naskiĝo de Esperanto!"

Konkludante, s-ro Serviŝev diris, ke ni ne havas rajton atendi la saman progreson kiel en Eŭropo aŭ aliaj civilizitaj landoj, ĉar la psikologio kaj la nekomprenebla animo de la popolo

estas tiel malsimila, ol iu alia. Profunde la hinoj estas esperemaj, pacifistaj kaj nemilitemaj.

Ce la fino de la parolado, la prezidanto kore dankis la parolinton por tiel nekutima kaj rimarkinde viva vortpentrado de hina popolo, rekte de sperta observanto mem, kiu sukcesis doni al la aŭdantaro novan komprenon de la situacio. La ĉesstantaro vigle subtenis kaj poste trarigardis grandan koleton da esperantistaj fotografaĵoj, gazetoj, libroj kaj flugfolioj.

GOLD COAST ENGLISH.

A correspondent of the "Manchester Guardian" supplies a document which throws a certain amount of light on those quite fashionable and frequently affectionate letters, often in the quaintest English, which invite one to send a kind word, a photograph, and a few (carefully specified) gifts to some complete stranger on the Gold Coast. The document is a pencilled letter written by a native schoolboy at Accra to his form master. It is addressed simply to "Master," and runs:—

"Dear Sirs,—It is honor most to respectfully to Write you this mail. I beg you to asked my promise felt But if you are willing to gift me. clap you hand for me. well, cheeirroo! hell o!! hello!!

I am your faithfull

XYZ.

It is just a little vague, but it obviously has the right spirit about it. When the lad really begins to feel his feet with Gold Coast English he will be a little more explicit about what "you are willing to gift me"—and more owners of names and addresses collected from English newspapers will receive a pleasant surprise from the morning postman. In the meantime, one can only commend the writer's second shot at "hello!!" He obviously felt that there was something a little open to misunderstanding about the first effort.

—"Daily Telegraph," Sydney, 22/2/27

ESPERANTO BY WIRELESS.

Esperanto by wireless is coming to form part of the programme almost everywhere. The Belgian stations are now introducing it.

—I.E.S.

KRONIKO.

SYDNEY, N.S.K.—En februara Kronikaĵo la Sydney-a raportanto menciis i.a. la trapason de mondvalanta biciklisto Kotulsky, el Riga, Latvio, kiu, laŭ gazetraporto en "The Sun," opiniis Esperanton nefika kaj laŭdis Anglan kiel mondlingvo.

Tiuj notoj estis legitaj en Nov-Zelando kun rezulto, ke aŭdante pri la alveno de mondbiciklisto en Wellington, samideano avertis la delegiton de U.E.A. (S-ron L. E. Dust) pri la paragrafo en "La Suda Kruc." Lian surprizon oni povas bone imagi, kiam S-ro Dust informis lin, ke la nov-alveninto ne nur estas s-ro Kotulsky, sed ke li kaj kelkaj grupoj anoj instruas tiun saman sinjoron nian lingvon! Tuj la lokaj membroj demandis la fremdulon ĉu la gazetraporto el Sydney estis prava kaj ricevis tute fidindan respondon.

Kiel sekvo la Sydney-a raportanto por "La Suda Kruc" ricevis de Wellington-a U.E.A. Delegito dokumenton subskribitan de s-ro Emanuel Kotulsky enhavante jenaj tre interesaj punktoj:—

(1) Mi nur povas malperfekte paroli la anglan lingvon;

(2) Gazetraportistoj en Sydney eketis angle kaj mi respondis tiel eble kiel bone mi povis. Kvankam Esperanto estis mallonge priparolata mi reniam diris ion kontraŭ ĝi ne sciante sufiĉe pri la temo.

(3) Kun praktika flanko de Esperanto mi ne renkontis ĝis mia alveno en Nov-Zelando.

(4) Danke al du-tri Esperantistoj en Wellington, N.Z. mi nun lernas Esperanton kaj aniĝis al U.E.A. pere de la tiea delegito.

Ricevinte tiun dokumenton la ĵurnalo "The Sun" aviziĝis, sed ne akceptis ĝin por publikigo. Per tiu oni konatiĝas kun la amikoj de Esperanto!

S-ro Kotulsky foriris de Nov-Zelando kun sia biciklo al Monte Video la 15an marto, kredeble elserĉante delegitojn dum la restaĵo de sia vago.

* * * *

La prezidanto de la Sydney Esperanto-Societo ricevis inviton de la "Institute of Pacific Relations," (Instituto de Pacaĵ Rilatoj) en Honolulu, Hawaii, sendi sugestiojn pri la enkonduko de Esperanto kiel kongreslingvo. Ĝis nun angla estis uzata

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj.

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE MELBOURNE.

kaj apenaŭ tempo sufiĉas ŝanĝi ĝin por estonta kongreso okazante proksimuman julion, sed se esperantaj grupoj tra Aŭstralio kunlaboras kun s-ro Simon, tre dezirinda aliigo povas rezulti.

AUCKLAND, Nov Zelando. — Je 24a februaro, okazis kunveno de la Aucklanda Esperantista Societo. Ĉirkaŭ kvindek ĉeestis. La prezidanto, s-ro J. S. Russell, bonvenigis kelkajn novajn membrojn kaj vizitantojn, inter kiuj troviĝis s-roj Huxton (Britujo), W. Stansfield (Aŭstralio), kaj W. H. King (Wellington).

Dum la vespero s-ro King paroladis al la ĉeestantaro pri la propono de restarigo de la Nova Zelanda Esperantista Asocio. Nune, laŭ N. Z. Adresaro ĉirkaŭ 300 da samideanoj troviĝas en 67 diversaj lokoj en la lando. La propono estas organizi por ĉiuj ĉi samideanoj unu nacian asocion, por ke la movado en N.Z. estu sur firma bazo; kaj ke la plej bonaj rezultoj por nia laboro estu havigotaj. Multaj izoluloj jam montris intereson, certigante ke ili subtenados. En la kunveno, s-roj Russell kaj Huxton ankaŭ parolis favore pri la propono, kiu nun restas en la manoj de la ĉi-tiea Societo, kiu esploras kaj konsideros ĝin laŭ ĉia vidpunkto.

Kiel jam faris aliaj gazetoj tra la mondo, la tagĵurnaloj ĉe Aucklando publikigis detalojn pri la mondkonata Esperantista edziĝo, de kiu la "Auckland Herald" enhavis grandan fotografon. Ŝajnas ke Esperanto ricevis tian publikiecon per tiu simple natura okazo!

WELLINGTON, N.Z. — Plua progreso rilate la vintran radian kurson de 2YK estas farita. Dum 25a februaro s-ro King intervjuis ĉe Aucklando, la redaktoron de la gazeto "N. Z. Radio," kiu, post multaj entoj pri kaj konsiderado de detaloj, decidis publikigi ĉiusemajne skeleton de lecionon, kiu estos klarigita de la sendstacio ĉe Wellington. Ŝajnas ke

la inaŭguracio de la kurso estas certa nun. Anonco relate al detaloj aperos poste.

De post junio ĝis decembro, 1926, ok lekcioj estis brodkastitaj de 2YK. Jen la temoj laŭvice de brodkasto: — "La Originalo kaj celoj de Esperanto"; "Generala Esplorado de la Esperanto Movado"; "Esperanto kaj Radio" (Part 1); "Komparo de Esperanto kaj la Angla" (Parto 2); "La 18a Tutmonda Kongreso de Esperanto"; "Esperanto en la Lernejoj"; kaj "Esperanto en Komercio." La lekcioj estis bone ricevataj; kaj estas notinde ke neniam plendo aŭ malkonkordo estis farita. Kiel rezulto de la paroladoj Esperanta Kurso perradie estis petita.

PROVO DE TEKNIKA INSTRUADO PER ESPERANTO.

L'Ecole speciale des Travaux publics, du Batiment et de l'Industrie (Speciala Lernejo por Inĝenierarto, domkonstruado kaj Industrio) en Paris, kiu posedas la plej kompletan kaj plej gravan organizadon en Francujo por teknika instruado perkoresponda, estas preta disvastigi eksterlanden tiun instruadon, por la profito de ĉiulandaj Esperantistaj teknikistoj kaj inĝenierlernantoj. Por komenci tian agadon, ĝi komisiis areton da kompetentaj Esperantistoj por traduki ĝian tutmonde konatan kaj ŝatatan kurson pri Armbetono, kun ekzercoj kaj korektaĵoj.

Bonvolu ĉiu intereso doni per simpla poŝtkarto sian nuran aprobon; tiu aproba avizo trudos al ili nenian devigon. Ili post nelonge ricevos pliajn necesajn detalajn informojn.

Ni varme konsilas al niaj amikoj fari ĉion eblan por sukcesigi tiun praktikan aplikon de Esperanto, ĉar ĝi liveros potencon argumenton por la disvolviĝo de nia lingvo en la Teknikaj kaj Sciencaj rondoj. Multaj skribu!! . . Jen la adreso:

S-ro Direktoro de l'Ecole speciale des Travaux publics, 3, Rue Thenard, Paris. V.

LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimata amiko

Kune kvar Aŭstraliaj Registaroj nun konstruas ĉe la rivero Murray la Hume akvo-rezervujo, kiu, kiam finita, estos kvar kaj duonoble pli granda ol la bone konata haveno de Sydney . . . grandega enlanda sensala maro, 200 mejlojn for de la oceano.

Kiam ĝi estos plena ĝi okupos 69 kvadratajn mejlojn, aŭ 44,000 akrojn, kaj entenos la egalecon de 2,000,000 akroj kovritaj ĝis profundo de unu futo da akvo.

Superflui la ĉirkaŭan landon estas la celo de tiu ĉi granda entrepreno. Iasu min faciligi la komprenon tiu ĉi maniere . . . la akvo konservota dum la vintro egalos la ricevon de ankoraŭ 6 koloroj da pluvo . . . kiam ĝi plej urge estas bezonata . . . sur areo de 6,000 kvadrataj mejloj! Nu do imagu kia beno ĝi fariĝos al la teruloj.

Multajn jarcentojn la rivero Murray fluis 1,800 mejlojn de la fonto ĝis la maro sen ia malhelpo. Tiam venis ŝanĝo, kaj 300 mejlojn de la fonto oni mase levis ĝin, por tiel diri, el la natura fluejo kaj sternis ĝin sur la ĉirkaŭan kampon for de la loko, kie oni intencas konstrui digegon.

La loko troviĝas kelkcentajn jardojn pli proksime al la maro ol kie la rivero Mitta Mitta kunigas kun la rivero Murray. En kvar jaroj, kiam la digo estos finita, la fluo de tiuj ĉi du riveroj estos haltigitaj. La akvo sin levos ĝis la supro de la digo kaj superfluos la riverbordojn, subakvigante vastajn terpecojn akron post akro, ĝis la akvo-rezervujo estos plena.

La rivero Murray estos altigita 50 mejlojn laŭlonge de ĝia fluejo, la rivero Mitta Mitta 25 mejlojn. La akvo-rezervujo prenos la formon de giganta ĉevalŝuo, kaj kiam ĝi pleniĝos, la poetoj laŭdos ĝian belecon.

En la valo Mitta Mitta troviĝas la urbeto Tallangatta . . . destinata al detruo! Kaj pli norden kie la Melbourne al Sydney vojo atingis al riveron Murray troviĝas ankoraŭ urbeto Bowena, ankaŭ destinata al detruo.

Multaj bienistoj ankaŭ devos forlasi siajn hejmojn, kaj trovi novajn. Kompreneble ke ĉiuj ricevos kompencon. Kelkcentoj da homoj estos genataj sed la akvo konservota es-

tos beno al kelkamiloj kaj treege riĉiga havaĵo por la Aŭstralia homaro.

La konstruado de la digo estas severe dividata laŭ du apartaj konstruaj planoj . . . ĉe la Viktoria flanko estas konstruata la longa tera digo kun betona koro kaj ĉe la Nova Suda Kimruja flanko oni konstruas la betonan muregon super kiu fluos la akvo, kiam la akvo-rezervujo estas jam plena, kaj per kiu oni kontrolos la akvon uzota por superflui la bienojn.

Ĉe la Viktoria flanko la digo estas interesplena pro sia koro. Ĝi konsistas el betono fortigita per fera stangoj, kaj kiam la digo estos finkonstruita, kunigos kun la murego ĉe la Nova Suda Kimruja flanko, kaj fariĝos ne trafluebla baro al la akvo. La koro komencas profunde sur la solida granito, multe pli profunde ol la originala riverfluejo, kaj grade mallarĝiĝas ĝis ĉe la supro ĝi mezuras ĉirkaŭ 3 futojn en diametro.

La koro ne estas konstruata por elteni premedadon sed por ke ĝi estu ne tra fluebla baro al la akvo. Tra tera digo la akvo eble trovus vojon kaj tuj la tuta konstruaĵo estus malfortigita. Tunelo troviĝas en la mezo de la koro, tra kiu homo povas marŝi, sed la celo de la tunelo estas kapti la akvon kiu povas flui super la koro, aŭ okaze trafenetri ĝian ĉeakvan flankon. Tia maniere la kontraŭa flanko estas ĉiam tute seka, kaj ne malfortiĝos.

La digo estos 4,258 futojn longa, bezonante 85,000 kubajn jardojn da betono, kaj 3,800,000 kubajn jardojn da amasigita tero. Estas interese kompari tiujn ĉi kalkulojn kun la kalkuloj por la Nova Suda Kimruja flanko de la digo. Tie 393,000 kubaj jaroj da betono estos uzataj kaj 93,000 kubaj jaroj da amasigita tero. La sumo de la tuta digo estos 478,000 kubaj jardoj da betona kaj 3,893,000 kubaj jardoj da teramaso, kiu, plej multe estas jam lokita.

La betona murego havos 1042 futojn da longa, kaj la digo havos 5,300 futojn da longo . . . iom pli ol unu mejlo.

La supro de la betona murego estos 132 futojn super la nivelo de la riverfluejo, kaj tiu ĉi akvo-rezervujo estos, kiam finita, la tria el la plej grandaj en la mondo.

Via fidele, P. H.

DIVERSAJO.

Erarscioj: La aĝo de bestoj.

Pri aĝo de bestoj oni povas aŭdi multe da eraraj opinioj. Plej malnova inter ili estas, ke ju pli granda estas besto, des pli longe ĝi vivas, kaj inverse. Laŭ supraĵa rigardo ĉi tiu aserto ŝajnas esti ĝusta, ĉar efektive, dum baleno kaj elefanto facile vivas kelkajn cent jarojn, ĉevalo aŭ orso vivas nur 40—50 jarojn, leono 35, apro 25, ŝafo 15, vulpo 14, leporo 10; muso jam en la sesa jaro kutimas fariĝi viktimo de la morto pro maljunago. Sed kiam oni pripensas, ke korvo, kiu ne estas pli peza ol la ses jarojn vivanta sciuro, povas traviĝi 100—150 jarojn, kaj pugnogranda mara anemono kun plena forto povas atingi 40—50 jarojn, montriĝas, ke la supra aserto estas erarscio.

Jama sorto trafas la opinion, ke la aĝo de bestoj dependas de la tempo de ilia evoluo: ju pli da tempo necesas, ke besto fariĝu plenkreska, des pli longa estas ĝia vivdaŭro. 24-jara elefanto ankoraŭ estas infano, 8-monata muso jam plenumatiĝis. Cardanus skribas en 1546: "Qui tarde crescunt, sunt diuturniores vitae." (Kiu malrapide kreskas, longe vivas.) Flourens eĉ fiksis la proporcion tiamaniere, ke la vivdaŭro estas kvinoblo de la evolutempo.

Homda vero estas en la afero, sed la tezo ne povas fariĝi ĝenerale valida. Multaj fiŝoj, rampuloj, birdoj maturiĝas en kelkaj jaroj, tamen vivas 100 jarojn, kaj kontraŭe inter insektoj estas multaj, kiuj evoluas en kelkaj jaroj, por ke ili, kiel plenumatiĝintoj, vivu eble nur kelkajn tagojn.

Ankoraŭ ekzistas kelkaj opinioj, kiuj nuntempe jam povas esti rigardataj kiel erarscioj.

La faktorojn, kiuj determinas la

vivdaŭron, oni ankoraŭ ne konas. Kiel ĝeneralan biologian tezon tamen oni povas akcepti la opinion de Weismann, laŭ kiu la vivdaŭro estas dependaĵo de la proporcieco inter la plimultiĝemo kaj la stato de danĝero. Besto, kiu estas tre multiĝema, kaj samtempe nek ĝin nek la idaron minacas danĝero, vivas mallonge, dum besto, kiu estas malmultida kaj inter konstantaj danĝeroj, vivas pli longe.

Ekzemple aglo, kiu havas poŝare nur du ovojn kaj kiu inter la multaj danĝeroj eble nur en 50 jaroj povas eduki idojn, vivas tre longe. Por la malgrandaj, pli facile vivantaj kaj pli multiĝemaj birdoj sufiĉas dekblo pli mallonga vivo, por ke la konserviĝo de ilia speco estu assekurata.

Ĉi tiu tezo pli malpli validas ankaŭ por la kreskajaro.

Kolomano Papp.

—El Heroldo de Esperanto.

The "Radio-Belgique" station in Brussels announces an Esperanto course in French commencing on 15 January. On the same day the Antwerp station "Radio-Zoologie" began broadcasting an Esperanto course in Flemish.

The Stuttgart station, whose broadcasts are received in Wuttemberg, Alsace and part of German Switzerland, has placed in its winter programme a series of ten lectures on the auxiliary language problem in relations to the mother country, wireless, aviation, the school, trade, science, diplomacy, social policy and employees.

The last Esperanto course broadcast by the Minneapolis Station (U.S.A.) has shown that interest in Esperanto is increasing in America. More than a thousand listeners-in have ordered grammars of the language.

—I.E.S.

THE READING OF ESPERANTO LITERATURE

is essential in order to obtain clear expression and good style.

WE HAVE AN EXTENSIVE STOCK OF THE LATEST LITERATURE
BY THE BEST AUTHORS.

Pro Iŝtar (Luyken), La Faraono (Kabe), Karmen (Merimee), Lilio (Synotte), The Complete Bible.

Send stamp for full price list. Include postage when ordering, 1d. for each 1/-.

MELBOURNE ESPERANTO SOCIETY, Box 731f, ELIZABETH ST. P.O.,
MELBOURNE.

PRINCE CHARLES OF SWEDEN AND ESPERANTO.

Prince Charles of Sweden, the brother of Princess Astrid, who married Prince Leopold of Belgium, is a convinced Esperantist. The Belgian Esperantist League, which had sent him a letter of congratulation on his examination in Esperanto, has received the following reply to its president written in Esperanto:

Stockholm, 4 December 1926.

Sir,

Please accept my best thanks and those of my parents for your kind congratulations on my examination in Esperanto. My Rector informs me that I passed with success and even with distinction, but I am well aware that I have still a great deal to study. I have also other languages to learn, which are so difficult that they take up all my time. Nevertheless I retain my interest in Esperanto and hope for its speedy victory. Will you be so good as to convey my best wishes to the Belgian Esperantists.

I was deeply touched by your kind expressions in regard to my sister, who has been so heartily welcomed by all of you in her new country.—Yours sincerely,

CHARLES.

—I.E.S.

THE TECHNICAL PRESS AND ESPERANTO.

The Swedish railwaymen's journal, "Signalen" regularly publishes a column in Esperanto.

The Germana neutral scientific shorthand organ "Deutsche Kurzschrift," (German Shorthand) published in Essen, gives an Esperanto summary in each number, in pursuance of the recommendation of the International Technical Press Congress, which advised all specialist reviews to facilitate their foreign circulation in this manner.

—I.E.S.

ESPERANTO IN THE POSTAL SERVICE.

Mention has already been made of the employment of Esperanto in the Russian postal services. The Soviet Postal Administration has also issued reply post cards with headings in Russian and Esperanto.

—I.E.S.

SUBAKVAJ URBOJ.

Ŝipestro de Kaspia komerca ŝiparo, Atajev, kondukante vaporsipon de Persujo al Baku, aliigis la kutiman vojon kaj veturis laŭlonge de la bordo de l' terlango Ŝihovaja. Lodo montris strangan profundon seninterrompe kaj akre ŝanĝigantan kaj donantan impresojn de salto.

La kaŭzo estis en tio, ke la ŝipo veturis super urbo, nun tombigita en akvoj de Kaspia Maro. En pli-malpli malprofundaj lokoj estis klare vidataj stratoj de urbo en azia arkitekturo.

Laŭ rakontoj de ĉi-tieaj fiŝkaptistoj similaj subakvaj urboj estas renkontataj en multaj aliaj lokoj de Kaspia Maro. Dum senventa, suna vetero oni povas vidi restaĵojn de urbo, kiu troviĝas proksime de ŝtona malprofundajo "Ignatjev." Antikva nomo de ĉi tiu urbo estas Horabaŝeher. Sur fundo de maro ĝis niaj tagoj konserviĝis ŝoseo, kiu komenciĝis apud fortikaĵo de Baku, poste sub akvo tieniĝas al Brailov-promontoro, ree eliras sur teron kaj apud vilaĝo Ŝihovaja kaŝiĝas sur fundo de Kaspia Maro.

En lokaj sciencaj rondoj oni opinias, ke urboj marfundiĝis kaŭze de fortega tertremo antaŭ kelke da jarcentoj ĝis nia tempo.

Trad. V. Vanifatjev.

—el Heroldo de Esperanto.

SCIENCE AND ESPERANTO.

Men of science in the Far East are increasingly making use of Esperanto. The observatory of Mount Taten, near Tokio, has just published in that language its voluminous aerological report for the year 1926.

Beginning with last year a group of Japanese doctors have published a scientific journal in Esperanto and Japanese, "Psikiatrio," dealing with the problems of psychology and neurology, under the direction of Dr. Junko Sibata, of the Imura-Bioin Hospital, Hatagaya, near Tokio.

THE GREATEST SPANISH LEXICON AND ESPERANTO.

The example of the great Spanish lexicon "Espasa" is significant. In this monumental work every word is accompanied by a translation in several languages and in Esperanto.

—I.E.S.

ESPERANTO AND THE BLIND.

Esperanto is taught in almost all the blind schools of the world. Books printed in Braille are very costly and their number in every language is sufficiently restricted. In Esperanto the blind of all countries have a very considerable common literature and a widely circulated international review. The first wireless journal for the blind has just been started by the great French publishing house of Chiron in Paris.

—I.E.S.

A WORLD CENSUS OF ESPERANTO.

On the occasion of the fortieth anniversary of the launching of Esperanto, a census of esperantists of the whole world will be organised under the direction of the head of the Esperanto Institute of Germany at Leipzig. (Address: Esperanto, Leipzig W.31). Esperantists throughout the world and especially those who do not belong to any Esperantist organisation, are requested to notify their names, addresses, etc.

—I.E.S.

ESPERANTO AND THE UNIVERSITIES.

We have already mentioned that the University of Zagreb (Yugoslavia) has established a chair of Esperanto in its commercial faculty.

Under the official patronage of the Chamber of Commerce the University of Valencia (Spain) has instituted a course in Esperanto in its foreign language programme.

—I.E.S.

ESPERANTO IN THE PUBLIC SERVICES.

Two delegates of the Finnish Railways have just made a journey through Europe for the purpose of studying the special traffic conditions in different countries. They visited 25 towns in 15 countries and travelled a distance of nearly 10,000 kilometers. The only foreign language which they used was Esperanto, which they found everywhere sufficient.

—I.E.S.

WIRELESS & ESPERANTO.

The "Deutsche Welle" (German wave) Station of Koenigswusterhausen commenced on 6 November the broadcasting of a new regular Esperanto course.

Radio-Geneva has been doing the same since 4 November.

On 9 October the Station at Novosibirsk in Siberia broadcasted its first lecture in Esperanto.

Radio-Vienna and Zagreb and the Station at Sydney, New South Wales, broadcast regular weekly items in Esperanto.

—I.E.S.

OFFICIAL EXAMINATIONS IN ESPERANTO.

For the third time official examinations in Esperanto took place in Vienna on 10th November, 1926. Thirteen candidates, among whom were 12 teachers and one foreigner, passed the teacher's examination with distinction. Four persons successfully passed the examination of capacity.

The examinations in Esperanto of the London Chamber of Commerce are about to be held in London.

—I.E.S.

ESPERANTO IN COMMERCIAL EDUCATION.

The commercial school "Merkur" of Zagreb has introduced Esperanto as a compulsory subject into its curriculum for 1926-27.

—I.E.S.

ESPERANTO IN CHINA.

"I found Esperanto very useful in China," reported Dr. Williams, medical superintendent of the London Missionary Men's Hospital at Hankow, in an interview upon his arrival in Sydney yesterday. The international language was making big headway among the southern Chinese, he said, and he found it most useful in his work. In Pekin he had given two addresses at a school where Esperanto was taught, and in Shanghai he received a letter from a Chinese who was connected with a group of 80 Esperantists. Such groups existed in various parts of south and south-west China, and elsewhere.

—"Daily Telegraph," Sydney, 22/2/27

GAZETOJ RICEVITAJ.

Argentina Esperantisto, 7; Amerika Esperantisto, 4; British Esperantist, 263; Belga Esperantisto, 12; Deutschreft, 7; Esperanto Preso, 3, 4; Heroldo de Esperanto, 2, 3, 4, 5; Informservo de la Internacia Labora Oficejo, 7, 8, 9; Internacia Esperanto-Servo, 13; International Language, Feb.; La Unuigita Tuthomaro, jan., feb.; La Nova Tago, 4; Oomoto Internacia, 13, 14; Pacifika Espero, 19; Verda Stelo, 1; Vegetarano, 1; Verda Mondo, 2.

ORIGINAL LITERATURE IN ESPERANTO.

Esperanto already possesses a considerable number of original works by authors of various nationalities. A new collection of original poems by the Hungarian poet Jules Baghy has just appeared.

—I.E.S.

THE INTERNATIONAL PEACE CONGRESS AND ESPERANTO.

Acting on a proposal of the English National Council of the Anti-war Congress, held in Geneva, adopted unanimously, at its sitting on 3 Sept. 1926, a resolution providing that, commencing from 1931, all speeches at peace congress shall be translated exclusively into Esperanto.—I.E.S.

NE ILI.

—Mia amiko,—diris la konservativulo,—vi volas, ke oni egale diskonu la tuthavaĵon, sed ĉu vi ne konsentas, ke se la tuta mono de tiu ĉi lando estis disdonita inter la popolo, ke tiuj, kiuj nun estas riĉaj, baldaŭ regajnus la riĉaĵon.

—Ne la homoj kiuj ricevis ĝin,—kiel heredaĵo respondis la sprita socialisto.

KONGRESO DE INTERNACIA "ROTARY-CLUB" OJ.

Kongreso de Internacia "Rotary-Clubs," grava asocio, kiu entenas 110,000 membrojn en 32 landoj, okazos en Ostende (Belg.) je la 5a de junio 1927. Jam kelkaj samideanoj, membroj de tiu Asocio, propagandis pri Esperanto en siaj kluboj kaj sukcesis interesigi ilin pri nia lingvo, ĉar la idealo de la Rotary' anoj multe similas Esperantismon.

Por utiligi tiujn unuajn sukcesojn kaj ebligi efikan agadon en la Kongreso suprealudita, estas necese, ke la Rotary'aj Esperantistoj antaŭe interkonsiliĝu. Tiucele ili do estas petataj konigi kiel eble plej baldaŭ siajn nomon kaj adreson al S-ro Rollet de l' Isle, 35, Rue du Sommerard, Paris. V. Francujo.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunveno: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendredo vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. T. Simon, Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunveno: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

Persista Grupo, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt. Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kunveno kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkredo vespere, je la oka horo.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.